

SANKTA BATALO APARTENAS AL ISLAMO

En lastaj semajnoj en amaskomunikiloj ni legas pli detalajn informojn pri en la ĉielon vokanta persekutado de la kristanoj en Irako kaj en Sirio. Ĉar homoj rapide alkutimiĝas al tiaj informoj kaj trapasas ilin en ĉiutaga hastado, mi citas: „La unuan fojon en la historio ne plu estas iuj kristanoj en Mosul,“ deklaris ĥaldeaj-katolika patriarko Louis Sako fine de julio. Dum forkuro ili rajtis nenion kunpreni. Sur kontrolaj stacioj estis al ili forprenita ĉio, ofte eĉ ŝuoj. Al tio la patriarko aldiras: „Kiel en Eliro aŭ simile kiel dum krucovojo fuĝis sensuaj kristanoj en brulaj someraj varmegoj en Irako en kurdajn urbojn Erbil, Duhok kaj Sulejmanie, inter ili ankaŭ malsanuloj kaj olduloj, infanoj kaj gravedaj virinoj.“

Tion, kion ĉi tie faras ekstrememaj islamanoj, estas dirate al ni, tio ne estas tipa por agmanieroj de muzulmanoj. Tio estas certa-grade vero. Sed ĉu ili rilate al kristanoj agas tute atipe?

Pli proksima rigardo al mondmapo de persekutadoj pro la kredo helpas tiun ĉi demandon klarigi. Helpverko por persekutataj kristanoj, fondita antaŭ 50 jaroj, nomata „Open Doors“ (Malfermita pordo), eldonas ĉiujare „Indekson de monda persekutado pro propra kredo“. Ĉar kristanoj en nombro de malnete 100 milionoj prezentas plejmulton de la persekutatoj, oni povas surbaze de tiuj informoj krei mapon de la persekutataj kristanoj.

Kiuj do estas tiuj landoj, kiuj plej multe subpremas homojn, kiuj ne identiĝas kun ilia reganta mondkoncepto? Inter unuaj dek landoj estas listigitaj naŭ islamaj, inter unuaj dudek estas ili dek kvin. Konkludo estas klara: Islamo, do tia, kia ĝi estas nuntempe, certe ne estas tolerema, kiel ĝi sin al ni ĉi tie

en Eŭropo prezentiĝas.

Sed ekzistas ankaŭ fragmentoj en Korano, kiuj ĝin prezentas kiel pacaman religion kaj priskribas Alahon kiel mizerikordan dion. Sed ekzistas ankaŭ aliaj, batalecaj suraĵoj, kiuj alvokas al perforta kovertiĝo al kredo, al servuteco, ja eĉ al likvido de malamikoj, nekredantoj. Estas racie kaj sencohave atentigi en dialogo kun muzulmanoj unualoke al nomitaj lokoj kaj alvoki ilin al ilia plenumado. Sed tio ne malebligu al ni ĝustan rigardon je islamismo.

En konsiderinda libro „Jesuo kaj Mohamedo“ komparas Mark. A. Gabriel, iama imamo kaj profesoro de universitato Al-Azhar en Kairo, kiu konvertiĝis al Kristo, tiujn du personulojn, iliajn instruojn kaj agmanierojn. Estas tre instrua, kiam oni volas formi imagon, ĉu kristanoj kaj muzulmanoj vere adoras la saman Dion.

Ni nur sciigu ĉi tie, kion li diras pri temo ĝihado (sankta batalo): „En Mekko praktikadis Mohamedo dum 13 jaroj toleremon konsidere al persekutado. Sed poste en Medino li formis armeon, alvokis al sankta batalo kontraŭ nekredantoj kaj kontraŭ siaj iamaj persekutantoj. Li promesis, ke Alaho premios tiujn, kiuj militos. Ĝis sia morto li ne ĉesis alvokadi al sankta batalo...“

Fone de ĉi tiu informo estas klare, kial sur mondmapo de la persekutataj kristanoj estas islamaj landoj tiel antaŭaj.

Estas plej matura tempo, ke ni kristanoj ĉi tie en Okcidento ekkonsideru tiun suferadon kaj solidariĝu kun niaj gefratoj en la kredo – kaj ni ĉiutage por ili preĝu. Ili pravas heroecan atestadon de la kredo. ■

Christof Gaspari
El Vision 2000 – 5/2014